nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2013

## GRAVA NOVAĴO PRI LA ZAMENHOF-TAGO

Kiel ni anoncis pasintnumere, Liceo planis festi la tradician Zamenhof-Tagon ĉijare denove en la ludoklubejo, kiu jam gastigis nin antaŭ du jaroj. Bedaŭrinde, en la lasta momento oni sciigis al ni ke la respondeculoj ne plu permesas la luadon de la loko, kaj do ni devos serĉi alian ejon por celebri nian feston.

La estraro de MEL nun serĉas alternativon, sed se iu madrida esperantisto havas kontakton kun aliaj ejoj, kiujn ni povos rezervi, bv. tuj kontakti kun la sekretario de MEL per la adreso madrido@esperanto.es (kun kopio al niavocho@gmail.com, ĉar ni ne certas ke la supra adreso estos akurate legata dum venontaj tagoj).

Ankaŭ la programo estas ankoraŭ sufiĉe malferma, kaj do ĉiu madridano kaj vizitanto kiu deziras proponi ideojn, povas kontakti kun la supre menciitaj adresoj.

## EKSPOZICIO EN MANOTERAS

De la 9-a de novembro, en la sidejo de la *Asociación de Vecinos de Manoteras*, estas montrata la ekspozicio *"Esperanto, lengua y cultura"*. La adreso de la asocio estas strato Cuevas de Almanzora, 46, proksime al metrostacio Manoteras.

Vidu raporteton en la kvartala retejo: http://www.hortalezaenred.org/spip.php?article2329

## ANA MANERO PREZENTAS BITOTEKON EN ROTERDAMO

La 2an de decembro Ana Manero, nome de HEF, prezentas la projekton Bitoteko ĉe la 3a Ĝenerala Jarkunsido de la Reto Europeana, kiu disvolviĝos en Roterdamo.

Europeana estas projekto de la Eŭropa Unio por krei publikan eŭropan bitotekon konsistantan el bibliotekaj, muzeaj kaj arĥivaj dokumentoj, oficiale lanĉita la 20an de novembro 2008. Ĝi celas doni aliron al la kultura kaj scienca eŭropa heredaĵo. Kiel ni informis en marto ĉijare, de tiu monato eblas tie trovi dokumentojn el Bitoteko, la bita biblioteko de HEF, kiu estis invitita al tiu ĉi kunveno ĉar provizanto de metadatenoj.

Profitante la fakton ke la 30an de novembro, okazis samurbe la ĉi-jara Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, Ana kontribuis ankaŭ al ties programo per la prezentado de la Bitoteko tiu-kadre.

## MIGUEL FERNÁNDEZ PREZENTOS LIBRON EN BARCELONO

Sub la titolo "Kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia poezio", Kataluna Esperanto-Asocio organizis serion de aktivaĵoj ĉirkaŭ la 15-a de decembro en Barcelono, dum kiuj ĉefrolos nia samklubano Miguel Fernández, prezentante la libron "Poezio: armilo ŝargita per futuro" eldonitan de SAT-en-Hispanio.

Jen la baza programo:

Vendredon la 13an de decembro: je la 19h00, prelego de Miguel Fernández kadre de la prezento de la libro Poezio: armilo ŝargita per futuro, en Espai Vilaweb. Tuj poste, frateca vespermanĝo kaj arta vespero, en El Bar del CAT, Travessia de Sant Antoni 6-8.

Sabaton la 14an de decembro: je la 12h00, vizito al "Fossar de la Pedrera". Je 19h30, vizito al la Revolucia Barcelono (renkontiĝo en Placo Katalunio)

Dimanĉon la 15an de decembro (zamenhofa tago): matene je 11h00, vizito al la Muzeo de Esperanto de Subirats, kun posta prelego "La lasta defendo de Barcelono" (pri la lasta

klopodo eviti la eniron de la frankisma armeo en Barcelono, en Subirats januare de 1939). Poste frata tagmanĝo.

Lundon la 16an decembro, je la 19h00, prelego de Miguel Fernández kadre de la prezento de la libro, en Llibreria Alibri, strato Balmes 26, Barcelono.

## BALDAŬ DENOVE EN RADIO VALLEKAS

La programo "La hora impía" (La malpia horo) de la komunuma radistacio Radio Vallekas, kiu jam en septembro intervjuis niajn samideanojn Pedro Sanz kaj Miguel Fernández, planas jarfinan elsendon pri Esperanto por la 29-a de decembro.

Atentu informojn en la retejo de la stacio http://www.radiovallekas.org/.

## HISPANA KONGRESO

Jam pretas retejo pri la 18-a Andaluzia kaj 73-a Hispana Kongresoj en Arundo (Ronda, provinco Malago), kiu okazos inter 1-a kaj 4-a de majo de venonta jaro 2014. Jen la adreso: http://arundakongreso2014.wordpress.com/

## JAM PRETAS LA ALIĜILO AL HEF POR 2014

Jam troviĝas en la reto la Aliĝilo al Hispana Esperanto-Federacio por la jaro 2014 http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2014eo.pdf.

Ĉijare la Ĝenerala Kunveno de HEF aprobis la kreadon de speciala kotizo por junuloj (malpli ol 30 jaroj), senlaboruloj kaj aliaj personoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj.

Por aliĝi, oni sendu la bultenon al la adreso admin@esperanto.es. Se oni aliĝas ĝis la 15a de decembro, la Esperanto-Tago, oni ankaŭ ricevos la lastan numeron de 2013 de la bulteno *"Boletín"*.

Aliflanke, aperis nova numero de la elektronika informilo de Hispana Esperanto-Federacio, “La Bitbulteno”. Ĝi estis sendita per retpoŝto kaj eblas ĝin aliri ankaŭ rete. Por ĝin ricevi, oni povas sendi mesaĝon al letero@esperanto.es.

## EN VIKIPEDIO

Dum du semajnoj, fine de novembro kaj komence de decembro, en la ĉefpaĝo de Vikipedio la artikolo de la semajno temas pri “Hispana literaturo de la Klerismo”. La adreso de la tuta artikolo estas https://eo.wikipedia.org/wiki/Hispana_literaturo_de_la_Klerismo.

## NIN VIZITIS

Meze de novembro gastis en Madrido tuluza esperantisto Sylvie Roques, kiu renkontiĝis kun kelkaj madridaj samideanoj.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

La babilrondo de decembro denove okazos venontan sabaton. Atentu novaĵojn en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj ankaŭ en la retejo de MEL: http://www.esperanto.es/mel.